

# Espero

# Katolika

*REVUO MONATA EN ESPERANTO*

(Honorata per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906)

**RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO  
LITERATURO. — ARTO**

**REVUO DE REVUOJ. — BIBLIOGRAFIO. — 'SAKOJ**

«Unum ovile et unus pastor.» (Joh. X, 16,) «Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta.»

## ARTIKOLARO

La progreso de la katolika movado en la Eklezio anglikana. — P-o A. RICHARDSON	257
Sep jaroj ĉe la lepruloj en Abisinujo. — Trad. Paul DESCHAMPS.	260
Internaciismo kaj Pacifismo. — J. DUROUX; trad. ARY-BOURG	265
La saluto al Mario sur Sisilia ŝipo. — CHATEAUBRIAND; trad. ELEDA.	269
Duelo antaŭ la fortepiano inter Liszt kaj Chopin. — Trad. SPERANZA.	271
Paĝo de l' Direktor	273
Fratino Ejerio. — Leo LESPÈS; trad. C. DE REY-PAILHADE	275
Kelkaj floroj socialaj. — HOLLANDANO	282
Libroj en aŭ pri Esperanto	285
Promenado tra gazetoj. — C. DE LA ROCUE.	286
Ŝakoj. — AL. WAGNER kaj J. ELLIS	288

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ce la Direktoro : P-o Em. PELTIER  
Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire) France

*Manuskriptoj neniam estos resendataj.*

Por la FRANCAJ poŝtmandatoj la Poŝtoŝefo estas SAINTE-  
RADEGONDE; por la NEFRANCAJ la poŝtoŝefo estas TOURS.

'Ĉiuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

---



---

**ABONEJOJ DE E. K.**

- FRANCLANDO 'Ce la Direktoro de E. K. — 'Ce la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, *Paris-V.* — 'Ce librejo Warnier kaj Ko, 15, rue Montmartre, *Paris.*
- ANĜLOLANDO British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand, *London, W. C.*
- BOHEMUJO-AUSTRIO : F. Topič, libr. Ferdinandova, 9, *Praha.*
- CILILANDO ; S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, *Santiago-Chili.*
- DANUJO Dana Esperanta Oficejo, S-o Monster, 54, B. 4. Osterbrood, *Kopenhago.*
- GERMANLANDO : Moller & Borel, 96, Prinzenstr., *Berlin.*
- HISPANLANDO : S-o A. Jimenez-Loira, Paterna, *Valencia.*
- HOLANDUJO : S-o H. B. van Zwet, Heerenweg, 51 bis, *Utrecht.*
- HUNGARLANDO : S-o Endra Varju IV, Kigyo, U, 62. em. 14, *Budapesto.*
- ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, *Fontanafredda de Pordenone (Udine).*
- LITOVUJO : P-o A. Dombrowski, en *Kovno, Rusujo.*
- NOVA ZELANDO : S-o A. J. Burges, libr. Devon Street, *New Plymouth (New Zealand).*
- POLUJO : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, *Warszawia.*
- PORTUGALUJO : D-o Malato, 37, Clerigos, *Portalegre.*
- RUSLANDO : Societo Espero, Bol. Podjaceskaja, 24, log. 19. *S. Peterburgo.*
- SVISLANDO : Librejo Garin, 20, rue Corrairie, *Genevo.*
- 

**KONDIĈOJ DE ABONO**

*Abono jara* : 5 fr. (2 Sm.). — En Franc. 4 fr. (1 Sm. 60).  
*Unu numero* : 0 fr. 50, a frankite, (20 Sd.)

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj : oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Poŝt-kuponoj internaciaj estas akceptataj.

*ATENTU! Sur la koverto de l' unua numero post la fino de l' abono estos stampata : Via abono finiĝis kun la lasta n-o.*

REKLAMOJ.— Ni ricevas grandajn anoncojn nur por UNU JARO (10 n-oj) Tuta paĝo kostos 100 frankojn; — 2-on-paĝo : 50 fr.; — 4-on-paĝo : 25 fr.; — 8-on-paĝo : 15 fr.; — 16-on-paĝo : 8 fr. — *Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 15, rue Montmartre, aŭ al la Direktoro de E. K.*

*Ĉiu abonanto havas rajton por 5-linia anonceto dum tuta jaro de l' abono.*

---

**KATOLIKA PREGARO**

EN KIU TROVIĜAS 'CIUJ DIMANĈAJ DISERVOJ

KAJ

LA PLIMULTO DE LA FESTOJ DE L' JARO

*Latine kaj Esperante*

APROBITA DE LIA ALTA MOŝTO M-o RENOU

*'Cefepiskopo de Tours (France)*

I-a volumo.— Prezo : 2 fr. 50 (1 Sm.) ĥindita : 3 fr. 10 (1 Sm. 20)

# ANONCETOJ

5 linioj senpage por abonantoj dum tuta jaro de l' abono. — Oni devos pagi 10 centimojn por ĉiu vorto post 5 linioj, aŭ mallongigi l' anonceton.

Sola kondiĉo antaŭa pago de l' abono.

## — KOMERCO —

*Vinoj* ruĝaj, blankaj, junaj k. maljunaj nepre naturaj, bonegaj, altgradaj (11° almenaŭ), senditaj senpere de bienuloj el Roussillon. Skribu al parokestro Andreu, en Fourques (P.-Or.), France. Petu prez. 8

*Esperantaj romanoj* tre bone preŝitaj, verkitaj de S-o Louis Rigoir, 26, rue du Progrès, Marseille, Franc. *En sonĝo*, parol. de Do Zamenhof: 0 fr. 75. *Kristnasko*, par. de Do Philippett: 1 fr. 50. *Kanto de l' Diabolo*, parol. de Aymonnier, 1, 50. 6-5

*Presmaŝinoj* kaj materialo por presejoj. Instalado de presejoj: tre rapidaj presmaŝinoj presantaj unu flankon de l' papero; brak-presiloj; tranĉo-maŝinoj por papero, kc. — A. Dubuc, mekanikisto-konstruisto, 15-17, rue Saint-Romain, Paris, Telefono 706-45. 11-5

*Stradivarius*, violono de 1690, vendebla ĉe Monakinoj, Casa di Ritiro, Zitelle Udine, Ital. 7

*Tandem'o* estas vendebla aŭ interŝanĝebla kontraŭ fraŭlina biciklo ĉe L. Polart, 44, rue Mozart, Paris, Franc., kiu ricevos ĉiam plezurege k. respondos leterojn pri socialaj demandoj. 18

*Bonega oleo* Toskan-oliva, prezoj konvenaj. Sin turni al S-o Luciano Graziani, Fontanafredda de Pordenone, Udine, Itall. 20

*So J. Pion*, 34, rue de la Comédie, Beaune (Côte-d'Or), Franc., sendas 12 malsimilajn vidaĵojn esperantajn pri Beaune, po 1 fr. 50 (60 Sd.). Li akceptas ko. espondon per steno-grafio Esperanta laŭ Pitman. 21

*S-no Eva Jouan*, Palais Belle-Ile en Mer (Morbihan), Franc. Artobjektoj faritaj de markreskaĵoj sur fajenco, ŝtofoj, papero. Laboro ne-riproĉinda kaj malkara. 25

*Grani-Zanon*, kunmetitaj lakto-ipo-fosfidoj: kuracilo la plej taŭga, serioza, ekonomia, honesta, populara k. sukcesplena kontraŭ anemio k. malforteco. Boteleto da 100 pilol. 2 fr.; 6 botelet. 10 fr. Eksterl. la poŝtelspezoj plie. Sin turni al So G. Zanon, Villadelconte, Padova, Itall. 26

*Libroj vendotaj*. Tri unuaj jaroj de *Lectures pour Tous*, netroveblaj en librejo. Ĉiu jaro formas beleg. volumon 1152-paĝ. in-4, en perfekta konservateco. Skribu al So Bourgery, 23, rue du Nouv.-Calvaire, Tours, Franc.

*Fama ruĝa vino* de Mercurey en boteloj k. bareloj. Campanigo de vinoj por bienuloj, laŭ prezo interkonsentota. Ch. Jadeau, en Mercurey (S.-et-O.), Franc. 27

## — KOLEKTISTOJ —

*S-o Derroite*, 108, avenue Victor-Hugo, Paris. Kolektas poŝtkart. de religiaj pentraĵoj, sed nur: 1-e per paketo po 12 aŭ 24; 2-e post anonco k. akcepto de l' nombro k. prezo; 3-e el muzeoj de l' urboj de l' sendantoj; 4-e pri vivo publika de J.-K. 1-5

*F-no Barbin*, Le 'Lion-d'Angers (M.-et-L.). Serĉadas, interŝanĝas, aĉetas antikvajn paperojn, leterojn de 17, 18, 19-aj jarcentoj. Kolektadas ankaŭ famajn aŭtografojn precipe de muzikverkistoj. 2-5

*S-o Al. Wagner*, Stanislau, 2, Aŭstrujo, s.k. 1.36, deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmark. nur kun komencantaj gefilatelistoj laŭ senf. 1908. Sendu anticipatajn kondiĉojn. 12-5

*Frato Mucien Louis*, prof., rue du Collège, 136, Verviers, Belg. estus tre feliĉa ricevi de afablaj samideanoj: divers. propagandilojn, malnovajn revu-numerojn k. ĉiuspecajn aĵojn rilatajn al Esperanta disvastiĝo. 15

*S-o Varju Endre*, Budapeŝto, IV, Kygio, C-E 62, em, 14, kolektas kaj interŝanĝas uzitajn poŝtm. 17

*Rusl. Saratov*, Kesto 12. G. Davidov pagas altan prezon por gazetoj «*Esperanto-Santander*», Saksa Esp. n-o 2, 1907, Japana Esper. n-o 3 1906 La Pioniro-India, n-oj 1, 2, 4. La Esp. Sofia, 1890-91. 23

Oni petas anglan vortaron kun elparolo interŝanĝe kun novaj Esp. libroj aŭ 3 antikvaj piaj libroj. F-no L. Petit, 23, av. du Ch. de fer, Vitry-s-Seine, Franc. 24

## — KORESPONDADO —

*So Marcel Générmont*, 11, place de la Gare, Moulins (Alliers), deziras korespondadi per ilustrit. poŝtkart, kun nefrancaj esperantistoj. 13-6

*Marco Lliro*, Escoles Pies, Sabadell, Espana. Katolika pastro, interŝanĝ. leterojn kun lertaj katol. literaturistoj ĉiulandaj pri respektiva nacia literatura historio. 5-5

So *H. Voirin*, Saint-Clément (M.-et-M.), Franc. Interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn kun ne-Eŭropanoj. 17

So *F. Rawicki*, Seminariano katolika, deziras korespondadi, se eble kun pastroj kaj seminarianoj. Adr.: Seminario katolika en Wloclawek, Polujo. 19

*Feliks Knapski*, Zgierr, Piotrk. gub. Poluj-Rusl., respondas tute senpage pri komercaj, industriaj k. negocaj informoj tie ĉi en Polujo. Kolektas k. interŝanĝas poŝtmarkojn. 22

*F-no Bernard*, ins., 1, rue S. Martin, Angers, Franc., deziras korespondi esperante aŭ germane kun Dresdenano aŭ -ino pri la Kvara. 28

13-jara knabo, Hermann Wuttke, deziras korespondi per poŝtkart. ilustrit. Adreso: Pionierstrasse, 21, Magdeburg, Germanl. 35-sp

So *Lawrence Klassen*, North Amherst, Ohio, U.S.A. deziras korespondi kun alilandaj geesper. per poŝtkart. ilustr. Nur bele kolorit. kartoj. Ciam respondos. 30

*Junaj Esperantistoj*, kiuj volas korespondi kun junul. en Esperanto volu sendi iliajn adres. al la rondeto « Junaj Esperantistoj en Graz ». Adr.: S-o Karl Bartel, Graz, Aŭstr. Friesbrichg. 29. 32

So *Henry Coppin*, 3, rue François-Cuvelle, Douai (Nord), Franc., deziras korespondi letere aŭ poŝtkarte. 30-j

— INSTRUO —

*Stenografio*. Sistemo por franca lingvo, aprobita de E. Duployé, 2 fr. Sin turni al aŭtoro P. Bavay, Le Havre (S.-I.). kiu volonte sendos senpage sian sistemon al ĉiu, kiu sendos al li informojn pri ĉio tuŝanta memor-arton. 9

*Amuzanta!* — Cours méthodique d'Espéranto, legu E. K. n-o 41, okt. 1907, p. 29; afrankite: 0,50. P-o Servais, Fosses (Namur), Belg. 10

So *J. Mistler*, direktoro de la dua-grada lernejo en St-Claude (Jura). Komercist-kurso. Instruado pri modern. lingv: Angla, Germana, Esper. Ital. Kursoj dum libertempo en aŭg. k. sept. Petu prospektojn. 3-5

*V. J. Baras*, instruisto pensiula en Bosson-Werbomont, Belg. k. lia filo Alexis, diplomita stenografisto (Duployé) akcept. lernantojn. Loko sana k. pentrinda. Fontoj de minerala akvo. 29

— DIVERSAJ —

*Aĉetantoj!* Atentu pri la maljustaĵoj, kiujn suferas mult. laboristoj. Favoru per viaj aĉetoj la firmojn, kiuj respektas principojn de justeco por siaj salajratoj. Anigu al *Sociala Ligo de Aĉetantoj*, aŭ fondu tian ligan, se ne ekzistas unu en via land. Petu inform. de Fno Magnier, 18, rue de l'Enseignement-Mutuel, Boulogne-s-Mer (P.-de-C.), Franc. 16

*Franco 33-jara*, bone edukita, scianta perfekte franc. lingv., deziras oficon de « akompananto » en familio ne-franca, aŭ de interpretisto en fremda hotelo. Skribu al S-o Hingant, 3, rue Boucicaut, Tours, Franc. 33-m

*Kontraŭ Pornografio*. Ni batalu kontraŭ ĝi aniĝante al unu el la Ligoj: « Moralité Publique », 47, rue des Petites-Ecuries, Paris; — Ligo kontraŭ « trolibereco » de stratoj, 10, rue Pasquier, Paris. 34-0

*Por blinduloj*. Oni povas helpi al disvastigo de Esperanto inter blinduloj, sin farante membro protekta de la Blindulgrupo Esperantista. Kotiz. 1 fr. jare. Woluwe, Belg. 31

## REKLAMOJ

(Vidu tarifon sur dua paĝo de l' hovorilo.)

**Faukner-Adresaro** de esper. korespondantoj, tre bone aranĝita, aperados de julio. Prezo (afrankite) kun enpreso de adreso 50 hel. 10 ekz. 4,50 K, 50 ekz. 21 K. — Esperanto-Oficejo de K. E. *Krupka en Hradec Kralové* (Bohemujo). — Sendu tuj vian adreson kun 0 fr. 55.

# ESPERO KATOLIKA

HONORATA PER APOSTOLA BENO DE PIO X<sup>a</sup>

la 27-an de junio 1906

## LA PROGRESO DE LA KATOLIKA MOVADO

*En la Eklezio Anglikana.*

En mia artikolo pri *Eklezio Anglikana* (E. K. n-o 38, p. 225), mi klopodis doni al niaj legantoj ideon veran pri tiu Eklezio. Mi esperas esti pruvinta kiom interesa estas tiu temo. La Brita nacio, la raso Anglo-Saksona, estas nature religia, kristana. Parto, sufiĉe granda, estas katolika, sed eĉ la parto protestanta posedas multajn fervorajn Kristanojn. Mi montris en mia artikolo, ke en la ŝtata Eklezio mem ekzistas partio, popole nomata « High Church ». La dogmoj de tiu partio tre similas al niaj katolikaj dogmoj, kaj multaj el tiuj homoj sentas veran amon kaj simpatian por ni, katolikoj.

Ĉu ne estas evidenta ke ni, kiuj amas la pacon, kiuj sopiras al la unueco inter ĉiuj, kiuj amas kaj kredas je Jesuo-Kristo, devas turni nin al niaj gefratoj, montrante al ili reciprokan amon kaj simpatian? Se la ideo intima de nia kara lingvo estas pligrandigi la amon inter ĉiuj homoj, certe ni, katolikaj esperantistoj, devus komenci la montron de tiu amo al niaj kristanaj gefratoj. Sed, feliĉe, ekzistas partio « High Church », ne nur en la Regno Brita, sed ankaŭ en Usono, partio, kiu pligrandigas ĉiutage, kiu sentime akceptas la titolon « Anglo-Romana ».

Laŭ ili la sola ŝanĝo por la diversaj societoj kristanaj estas ilia baldaŭa unuiĝo kun la Sidejo de Sankta Petro. Mi proponas sciigi al la legantoj de E. K. la ĵurnalon de

tiu ĉi partio. Ĝia titolo estas *The Lamp* an Anglo-Roman monthly, devoted to Church Unity (*La Lampo*, ĵurnalo monata Anglo-Romana, dediĉita al la kaŭzo de la eklezia unueco). Ĝi estas eldonata en Graymoor, New-York, Usono. Jen la opinioj de tiu ĉi ĵurnalo pri la S-ta Roma Eklezio « En ĉiu homa-societo estas kondiĉoj, por ke ĝi povu ekzisti kaj daŭrigi ke ĝi havu centron, rekonatan de ĉiuj el siaj anoj. Nu, Eklezio kristana, kvankam ĉia pro sia deveno, estas tamen homa pro siaj anoj en tiu ĉi mondo; ĝi bezonas do centron rekonatan de ĉiuj. » Laŭ la verkistoj de la « Lamp », Kristo mem donis tian centron, tiun Cefon aŭ Estron en la persono de S-ta Petro, kaj la tradicio katolika, de la tempoj la plej antikvaj, rekonis la Sanktan Sidejon Roman kiel la Sidejo de Petro, kaj la Die donata centro de la Kristana unueco. Do, ili konkludas, la societoj kristanaj kiuj, je la pasinto, apartiĝis de la S-ta Sidejo, agis kontraŭ la volo de Dio; ili ne plu estas en la normala stato, ordonita de Dio; do, ili ne povas esperi, ke ili ricevos la plenan dian benon.

Ili ŝajnas opinii, ke la unueco kun la S-ta Sidejo ne estas absolute necesa por la katolikeco de Eklezio nacia, ĉar ili pretendas, ekzemple, ke la eklezioj anglikanaj en Britujo kaj Usono estas veraj branĉoj de la Eklezio de Kristo. Tiu opinio ŝajnas ne tre konsekvenca. Efektive se Kristo mem elektis Petron kaj la Sidejon Roman de Petro kiel la centro de la unueco kristana, ŝajnas al ni sekvi evidente, ke tia kondiĉo estas *dia*, do absolute necesa. Sed ni devas multon pardoni ĉe ili, pro la influo de tradicio nacia, kaj de iliaj studadoj.

Mi ne sentas la deziron kritiki detalojn, sed plivole ĝojege konstati la progreson, kiun tiuj piaj viroj jam faris proksimiĝante pli kaj pli al la perfekta kredo de la Roma Eklezio. Ĉe la belaj kaj kleraj artikoloj *La dukampoj*, *La Mastro universala*, *La Reformo Protestanta*, *La ideo de Eklezio « uniate » angla*, *La atesto de D-ro Lightfoot pri la Papa supereco*, ktp., ni trovis multegajn amoplenajn aludojn al la S-ta Patro kaj al la



Roma Eklezio, kaj ne eĉ unu vorton malafablan aŭ vundantan. Ni katolikoj, kiuj tiom deziras la unuecon inter ĉiuj kristanoj devas montri nun nian amon, kaj tutkore etendi niajn manojn al niaj gefratoj, kiuj revenas al ni.

Sed niaj amikoj ĉe la « Lamp » konsentas preskaŭ tute kun ni katolikoj, ne nur pri la supereco de la S-ta Sidejo, sed pri multaj aliaj dogmoj de nia kredo. En la artikoloj *La du vojoj*, *Multum in Parvo*, *La Raporto de la kunveno* de la « English Church Union », la verkistoj klare kaj sentime defendas kaj profesas la dogmon de la Roma Eklezio pri la ĉeesto reala de Krista en la Sankta Eŭkariŝtio. Ili pretendas, ke la dogmo de la Transsubstanciigo estas la *sola vera*; ke ili tute kredas en Purgatorio, la alvoko de la Sanktuloj kaj la kulto al la Dipatrino tiel, kiel tiuj dogmoj estas difinitaj de la S-ta Tridentina Konsilio.

Plue, en la bela kaj klera artikolo pri la *Fraŭleco de Pastroj*, la verkisto energie defendas la disciplinon tradicionan de la Eklezio latina. Lia doktrino estas tute prava, kiam li klarigas ke, kvankam la fraŭleco de pastroj ne estas afero pri dogmo, sed pri disciplino, tamen la sperto de la pasintaj jarcentoj, kaj precipe la neceseco de la tempoj modernaj pli kaj pli pruvas la saĝecon de tiu sankta regulo. Pli kaj pli la eklezio bezonos apostolojn, kaj la vera apostoleco postulas sindonecon, kiun *sole* la fraŭleco povas certigi.

Mi bedaŭras, ke la spaco en E. K. mankas por pli malvolvi tiun temon hodiaŭ; sed mi esperas povi denove aliafoje reekzameni la demandon. Mi permesas min rememorigi la vortojn de nia kara Redaktoro en sia bela « Publika letero al ĉiuj pastroj kristanaj », li skribis: « Cu vi ne pensas, ke nun alvenis tempo, kiam oni povus paceme kaj frate ekzameni tiujn malnovajn malkonsentojn? » (E. K. jan. 1906). Niaj karaj fratoj en la « Lamp » ŝajnas respondi al tiu ama alvoko; sed eble ili ne konas nian ĵurnalon. Mi certe sendos tiun ĉi numeron al la Redaktoro de la « Lamp ». Se li ne scias Esperanton,

almenaŭ li facile trovos amikojn en Usono, kiuj tradukos mian artikolon al li. Mi kuraĝas diri, ke nia kara Redaktoro ne rifuzos enpresigi artikolojn pri la temo de la unueco venantajn de fratoj tiel bone inklinataj. Se ili preferus skribi Angle, mi volonte esperantigos ilian verkon.

« Benataj estas la pac-amantoj, ĉar ili nomiĝos la infanoj de Dio. »

Abato Austin RICHARDSON.

Profesoro en Institut St-Louis, Bruselo.

## SEP JAROJ ĈE LA LEPRULOJ EN ABISINUJO

*Interparolado kun P. Marie Bernard*



La lepruloj abisiniaj. — Kiel fondiĝis la leprulejo de Harrar. — Konvertiĝoj de mahometanoj. — Kredo ekfloras en amo. — Misiistoj ŝlegistoj, presistoj kaj publicistoj. — La leonoj de Imperiestro Menelik. — Apostola lingvaĵo.

Patro Marie Bernard apartenas al la apostola vikariejo de Harrar, komisiita al Lia Episkopa Moŝto Jarosseau. Li alportis, tiujn ĉi lastajn tagojn, al Papo leteron aŭtografan de l' imperiestro Menelik. La Negus'o dankis la Papon pri la respondo, kiun la Sankta Patro estis sendinta al li, kaj pri la donacoj, kiujn P. Marie Bernard estis alportinta samtempe en la nomo de Lia Sankteco Pio X-a. Oni scias, ke la Etiopuja regnestro donacis al la Ĉefa Pontifiko du leonidojn, kiuj estas enkaŝigitaj en la Vatikanaj ĝardenoj.

Dum la solena aŭdienco, kiun li donis al P. Marie Bernard antaŭ lia foriro Eŭropon, la imperiestro Menelik lin aparte dankis pri la sindonemo, per kiu tiu religiulo sin dediĉis al Harrar-lepruloj. Tiu faritaĵo multe kunhelpis pligrandigi la ŝatatecon pri la katolikaj misiistoj ĉe la Menelika kortego. Pri tio mi demandis la P. Marie Bernard.



— Nu, vi vin dediĉas do, de sep jaroj, Mia Patro, al la leprulejo en Harrar. Kiel estas vi alkondakita entrepreni tiun ministrajon verŝajne tiel senfruktan?

— Estas en Abisinujo, respondis al mi P. Mario Bernard, granda nombro da lepruloj. Jam Monsinjoro Taunin estis ekpensinta helpi tiujn malfeliĉulojn. Nu, antaŭ proksimume sep aŭ ok jaroj la Raz (ĉefo) Makonnen — la granda protektanto de la misio en Harrar — absolute petigis al Monsijoro Jarosseau krei leprulejon. Rimarkinda afero, en la tempo mem, kiam la Raz'o Makonnen tiel iniciatis, tiam mi troviĝis en Lourdes (Lurd), kie, kun Lia Moŝto Jarosseau, mi preĝis la Sanktan Virgulinon forigi la malhelpojn, kiuj kontraŭstaris de proksimume dudek jaroj mian foriron en mision.

...Tio klarigas al vi kiel, forirante Harrar'on, mi proponis min por krei tiun farotaĵon pri lepruloj.

Harrar estas urbo enhavanta kvardek mil loĝantojn. Kiam mi tien alvenis, mi trovis tridekon da lepruloj, enfermitaj kiel bestoj, sub la muroj de la urbo. Oni estis ilin foriginta, oni evitis ilin, oni estis fiksinta al ili, kiel devigata loĝejo, tiun lokon. Tie ili surkampadis, kiel ili povis, sub mizeraj kajutoj. Multaj pligrandanombre estis forkurintaj...

— Vi trovis do, en Harrar, la leprulojn en situacio similanta tiun, kiun ili havis en Judujo, tempe de Nia Sinjoro, — pariaojn forprenitajn el la homa Societo.

— Jes, mi iris al tiuj tridek lepruloj, petante ke ili lasu min flegi ilin. Ili danke min akceptis, kaj dum du jaroj, mi aliris ilin ĉiutage. Dufoje, ĉiusemajne, religiulinoj Franciskaninoj venis min helpi; ili nature prenis sur sin bandaĝi la leprulinojn.

Oni sciis baldaŭ, ke la Harrar-lepruloj estas flegataj, kaj ilia nombro pligrandiĝis. En du monatoj, ĝi atingis ducent.

La Raz'o Makonnen estis tre atentinta pri tio. Vidinte, ke la Patroj persistas en sia celo, li decidis ilin helpi efike. Li venis mem elekti, je ducent aŭ tricent metroj de la urbo, teraĵon, kiun li donacis al ili.

Tie, per la kunlaborado de miaj misio-fratoj, mi konstruis la vilaĝon de la lepruloj.

Ni prenis sur nin — ilin efektive gastigante — kvindek (precize kvindek unu). La aliaj venas bandaĝigi sin tri fojojn ĉiusemajne.

— Cu estas maldiskrete, mia Patro, peti de vi kian apostolecan specon vi praktikas apud tiuj malfeliĉuloj?

— Nia tuta apostoleco konsistis el zorgoj, kiujn ni donis. Ni rilatis efektive nur al Mahometanoj. La aliaj, antaŭsciigitaj kontraŭ ni, ne kuraĝis ankoraŭ peti niajn zorgojn. Dum la unuaj jaroj, ni povis kredi, ke nia ministraĵo restos spirite senfrukta.

— ..Kaj ke vi estos devigataj konsenti tiun opinion tiel diskonatan Mahometanoj estas «nekonvertigeblaj».

— Jes. Ŝajnis eĉ ke nia sola rekompenco konsistos el insultegoj, kiujn iuj el niaj gastuloj suferigis al ni. Cu tiuj malfeliĉuloj ne imagis, ke ni prizorgas ilin pro profitamo, ke oni pagas nin pro tiu laboro, fine ke ni trovas en ĝi nian utilon.

Post du jaroj kaj duono, unua lumradio!... ian matenon, leprulo diras al mi, ke Lia Moŝto Taurin al li aperis, kovrita per tuniko je brila blankeco kaj konsilis, ke li surmetu similan tunikon. Kaj kiel mi havigos ĝin al mi, estis demandinta la leprulo. Tiu tuniko, respondis Lia Episkopa Moŝto Taurin, estas la simbolo de la bapto. Petu la Patron, ke li tuj pretigu cin por ĝin ricevi, ĉar hodiaŭ mem ci estos kun mi. Efektive la leprulo, kiu estis farinta al mi tiun rakonton, troviĝis tre bone disponigita, kaj, ĉar liaj fortoj ekfiniĝis, mi baptis lin la saman tagon, kaj dum la vespero li mortis.

Tiu okazintaĵo vive influis sur la aliajn leprulojn, kiuj nomis «jupeto de Lia Moŝto Taurin» la kajuton, kie estis okazinta tiu mistera sceno.

Dum pli ol du jaroj ankoraŭ ŝajnis, ke tiu konvertiĝo restos epizodo izolita. Sed niaj lepruloj estis tamen fine konvinkiĝintaj, ke nia laboro estas tute neprofitema. Kio okazis en ilia animo? ...Kio ajn estas, ian tagon, ili

unuvoĉe petis, ke ili ankaŭ estu pretigataj por bapto. « Religio, ili diras, kiu inspiras tiajn sindonemojn povas nur esti vera. »

— Kaj tiel ĉiuj viaj lepruloj estas hodiaŭ katolikaj?

— Ĉiujn, kiujn ni gastigis, escepte virinon. Ilia kredo estas cetere el plej vivaj. Ili havigas hodiaŭ al ni tiom da konsoloj, kiom da ĉagrenoj ili kaŭzis iam. Ili estas fervoraj kristanoj praktikantaj konfeson kaj komuniĝon ĉiusemajnan. La leprulejo de Harrar similas hodiaŭ religian socion.

Detalo tre signifa : tiel longe kiel niaj lepruloj estis Mahometanoj, ili rifuzis sin interflegi. De kiam ili ricevis la gracon de la bapto, ili praktikas unuj kontraŭ la aliaj la plej kortuŝantan kariton. Propramove, ili interbandaĝas siajn vundojn.

— Cu la konvertiĝo de viaj lepruloj, mia Patro, estis konita en Abisinujo?

— Tie ĝi havis gravan eĥon. En Abisinujo, la novaĵoj diskoniĝas, de buŝo en buŝon, kun treega rapideco. Vi komprenas, finis Patro Marie Bernard, ke se la Harrar-leprulejo estis hierau kara al mi, ĝi fariĝis ankoraŭ pli kara hodiaŭ.

— Sed kiel vi povas provizi per nutraĵo la kvindek leprulojn, kiujn vi gastigas?

— La sesdekkvin leprulojn, mi devas diri, ĉar ni pli-grandigas iom post iom laŭ niaj rimedoj la nombron de la malfeliĉuloj, kiujn ni plene prizorgas...

He ! certege, tiu ŝarĝo estas peza. Ĝi estas unu el tiuj nekalkuleblaj faritaĵoj, kiujn helpas la franca karito, kaj ni devas ĉiam konfidi al ĝi.

Deziremaj tamen multoblige ĝiajn efikojn, sufiĉante kiel eble al ni mem, ni organizis en Harrar malsanulejon, kies materialo estis certe simpligita en la komenco. Sed iom post iom ĝin ni plibonigas. Kion diri plie? Ni havas monatan revuon, la *Semisto de Etiopujo* — ilustritan revuon ! — kiu ĉiaflanke iras porti al Abisiniaj amikoj novaĵojn pri nia kara misio, kaj kies abonoj iĝas iomete

samtempe rimedo por la leprulejo. Tiun revuon, senutile diri, ni « faras » en ĉiuj sencoj de l' vorto, tial ke ni estas samtempe redaktoroj kaj tipografiistoj. Kion vi volas? Por savi la animojn, flegi la korpojn, misiisto estas preta fari ĉiujn metiojn.

— Ĉu ne estas ja cetere, mia Patro, rimedo pligrandigi simpation inter la katolikaj misiistoj kaj la Abisina popolo! Kiam mi havis la honoron interparoli en Romo kun la anoj de la Abisina Mision, mi estis atentigita pri la deziro kiun ili elmontris, posedi profesiajn lernejojn — lernejojn en kiuj oni instruas la junajn Etiopanojn pri la plej perfektaj terkulturaj metodoj, kaj pri ĉiuj manmetioj.

— Kaj efektive tiun vojon ni pli kaj pli eniras.

— Lastan demandon, mia Patro. Vi alportis donaco al Papo, en la nomo de la imperiestro Menelik, du junajn leonidojn. Mi imagas ke tiu donaco devas havi specialan signifon?

— Signifon tre precizan ĝi estas la donaco, kiun la imperiestro Menelik sendas al reĝnestroj. Vi scias cetere, ke la leono eniĝas en insignaron de la Etiopa Negus'o, kiu nomiĝas mem « la leono de la gento de Juda ». La imperiestro fine tre certe rimarkis, ke la Papo Pio X-a portas, li ankaŭ, en sia blazono, la leonon de sankta Marko.

— La intenco estis do tiel delikata, kiel signifa estis la oferdono. La leonoj de l' imperiestro Menelik trovos sian ŝirmejon en la flankoj de la groto starigita en la honoro de la Senmakulino, en la Vatikanaj ĝardenoj ili estos tie la vivanta simbolo de la fortika popolo, kiu haltigis, en Nord-Afriko, la Mahometanan ekokupadon, kaj kiu konservis — izolita el Eŭropo' katolika — sian fervoran kredon al Kristo, kaj sian piecon kontraŭ la sankta Dipatrino.

— Jes, konkludas la P. Marie Bernard, kaj vi komprenas, ke mi neniam volas forlasi tiun Harrar-leprulejon, tiel videble benitan de Dio, kaj kiu diras al Abi-

sinoj per maniero, kiun komprenas ilia koro, la neprofiteman amon de iliaj katolikaj fratoj.

— Iliaj katolikaj fratoj de Francujo, mia Patro, vin helpos daŭrigi tiun tre konvinkan pruvadon.

B. SIENNE.

Tradukis Paul DESCHAMPS (laŭ *La Croix*).

## INTERNACIISMO KAJ PACIFISMO

(*Sekvo*).

Kiun sintenadon ni, katolikoj, devas havi pri internaciismo kaj pacifismo?

Ne bezonas diri, ke ni nenion povas prunti de l' formuloj de Hervé, nek de tiuj de Bebel. Hervé nur « muflo » kaj « ĉarlatano », laŭ la diroj de siaj kunfratoj socialistaj. Mi kredas, ke li estas io plie — li estas furioza frenezulo, kiun oni refutus per la malliberigo en frenezulejo. Pacifisto, li ne povis doni al la folio, kiun li kovras ĉiusemajne per epilepsia prozo, pli bonan titolon ol *La Sociala Milito*. Malamiko de l' milito, predikanta la mortigon de l' oficiroj, kiuj direktos ĝiajn operaciojn, ĉu ne li skribis antaŭ kelkaj tagoj « Brave, Beni-Snassen, forte frapu la rabistojn, kiuj invadas vin. Fine ili premeĝos vin, ... sed, almenaŭ, igu niajn Tartufojn patriotajn, kristanajn aŭ respublikanajn pagi sian hipokritecon kaj malnoblecon. » — Pri Bebel, kvankam li proklamas la realecon de l' naciaj interesoj, kvankam li certigas, ke li verŝos ĉe sian lastan sango-guton por la defendo de sia patrujo en milita okazo, lia pacifismo havas tamen malbonan aspekton. Aŭdante tiujn sinjorojn, ĉu de l' social-demokratio germana, ĉu de l' franca socialismo pli-malpli unuigita, ŝajnas ke sur la terglobo estas nur la « proletaria klaso » kaj ĝiaj « interesoj ». La pacifismo, laŭ ili, estas nur egoista teorio de kategorio de individuoj, kiuj, kvankam ili estas nomataj « laboristoj », ne estas pro tio

la solaj laboristoj, nek la solaj landanoj interesindaj. La milito, en la komuna koncepto kiun ili faras pri ĝi, estas nur la brutala forto servanta la kapitalistajn interesojn. Jen ideo tre simplista, tre mallarĝa kaj tre egoista. La milito estas ekstrema rimedo, kiun oni uzas pro manko de aliaj pli bonaj, por defendi ĉion, kion la membroj de nacio havas plej karan, kaj kion ili unuigite posedas honoron, kutimojn, apartajn morojn, tradiciojn, liber-econ, ktp. Sendube oni defendas ankaŭ la integralecon de l' teritorio, de l' industriaj entreprenoj, de l' privataj propraĵoj; sed diri, pro tio, ke nur la kapitalistoj estas interesataj, estas meti ĉiujn Francojn ĉe la rango de kapitalistoj ĉar kiu homo, en Francando, ne havas intereson ian, eĉ ekonomian, resti Franco? Se ekzistas tiu homo, li iru en Germanujon aŭ aliloken, neniu malpermesos al li tion; sed tio, kion la natura saĝeco de ĉiulando malpermesos, estas ke, en la nomo de pretenditaj interesoj de ia klaso, de malplimulto de teoriistoj, ĉiuj kiuj volas ĝui pace sian situacion en ia patrujo, estos liverataj sen defendo al la avideco de najbaroj, kiuj ne havas saman koncepton pri « frateco universala ».

Ni ne devas plimulte kredi al belaj trompaĵoj, kiuj plaĉas al kelkaj spiritoj. Antaŭdiri, kiel faris Victor Hugo kun sia kutima tromemfido, ke post kelkaj jaroj la paco estos definitive starigata inter la nacioj, estas prepari dolorajn maliluziojn. Kelkaj pacifistoj, cetere, nur prenas de J.-J. Rousseau kaj transmetas en la internaciaj rilatoj lian teorion pri la natura boneco de l' homo. Nu, jen granda eraro, al kiu cetere malmultaj serioze kredas hodiaŭ ni ne plu estas en la XVIII-a jarcento, kaj la Revolucio kun ĝiaj ekcesoj sufiĉe sciigis nin pri la *natura boneco* de l' homo. Ne per la deklamoj de utopiistoj la pacifismo havas ian eblecon de progreso.

Feliĉe, ekzistas alia maniero por prediki pacon. kaj tiun manieron ni, katolikoj, devus pli decidite proprigi al ni kaj apliki grandanime. La ideoj pri justeco internacia, frateco interpopola, solidareco de l' homaro,



apartenas al ni propre. Kial do ni lasus ekspluati ilin de aliaj, kaj kial ni ilin forlasus kiam ni vidas ilin mask-vestitaj, prezentataj kun koloroj, sub kiuj ili ŝajnas senfruktaj aŭ eĉ danĝeraj revoj? Tro longe kaj tro ofte ni observis la taktikon resti en nia indeco kaj lasi ekster nia influo ideojn, grandanimajn sentojn, kiujn aliaj ekspluatis por sia profito kaj kontraŭ ni. Kaj tiu sintendo donas al ni ŝajnon de malkontentaj personoj, kiuj koleretas, al kiuj oni ĉiam devas doni plej bonan lokon kaj plej facilajn rolojn por igi ilin kompreni kaj kunhelpi al laboro.

De ĉirkaŭ dek jaroj, du grandaj diplomataj kongresoj kunvenis en La Haye por studi rimedojn solvi konfliktojn internaciajn. Oni tie provis precizigi la rolon kaj praktikan aplik-manieron de arbitracio en konflikta okazo. Sed en ambaŭ kongresoj, oni forigis el la kompetenteco de l' arbitracia tribunalo ĉiujn demandojn pri honoro aŭ vivaj interesoj de landoj en konflikto pro tio ĉiuj, kiuj pretendas ne esti « naivaj » proklamas la bankroton de la Kongreso de Paco! Same, oni tie devis trakti la malarmon. aŭ pli ĝuste la limigon de l' armadoj. Nu, tiu demando ricevis ankoraŭ neniun solvon: do, rediras la samaj, bankroto pri ĉiuj demandoj!

Tie ĉi la naivaj, la vere tre naivaj, estas tiuj, kiuj tute ne kredas esti tiel. Efektive, ia dozo de simplista simpl-animeco estas necesa por imagi, ke tiel gravaj demandoj povas post kelkaj monatoj aŭ kelkaj jaroj ricevi solvojn firmajn kaj definitivajn. Kion oni povus diri kontraŭ ĉiuj kongresoj, se oni kontraŭmetus, unuparte la multecon de l' deziroj, aliparte la malgrandecon de l' praktikaj rezultatoj ricevitaj! Reale, la kongresoj, tiuj de l' paco kiel la aliaj, nur preparas solvojn, kaj ju pli tiuj ĉi estas gravaj, des pli multe da tempo estas necesa por ilia realigo. Oni mokis la « festenojn » de La Haye, oni plezure ridindigis tiujn diplomatojn kiuj, post kelkaj longaj monatoj pasigitaj ĉirkaŭ verda tapiŝo, ricevis neniun alian praktikan rezultaton ol kosti 2.618.000

frankojn kaj esprimi, disigante, kelkajn dezirojn. Oni povas, tiu-lude, pruvi multon da spriteco, sed en kiu saĝa juĝo montriĝas ne-brile. Certe ni ne konsideras kiel tre seriozajn kaj tre praktikajn personojn ĉiujn, kiuj partoprenis en la Konferenco de La Haye. Sed ne tie estas la demando. La demando estas scii, ĉu antaŭ tia fakto oni devus fari alion ol moki; ĉu ne estas tasko plenuminda, kunlaborado doninda?

Sendube ankoraŭ, en 1899, pro la timoj kaj malgrandanima jaluzeco de Italujo, la Kongreso, pelante la riprezentanton de l' Sankta Sidejo, senigis sin je la plej efika kunlaboranto, kiun ĝi povis trovi. Tion oni devas diri tre laŭte, sed aliparte ni ne devas, dum ke ni estas ekstere, moki kaj malaplaŭdi tiujn, kiuj laboras interne.

Nenia ideo apartenas pli propre al la katolika religio, ol la ideo de universala frateco; kaj reale, kiel rimarkigis, en 1899 al Caro la kardinalo ŝtata sekretario Rampolla « La paco ne povos trovi sian bazon, se ĝi ne estos apogata sur la fundamento de l' publika kristana rajto, el kiu rezultas la interkonsento de l' princoj kaj la interkonsento de l' popoloj kun iliaj princoj. » Ĉiutempe la la Sankta Sidejo estis la granda paciganto de l' nacioj; hodiaŭ ĝi estas ankoraŭ vokata kiel arbitro en konfliktoj internaciaj, kaj antaŭ la internaciaj maljustaĵoj, kiuj okazis dum la lasta jarcento, ĝi estis preskaŭ ĉiam sola por protesti oficiale en la nomo de l' kristana justeco, ĉar ĉiun alian oni forĝesis en la rilatoj internaciaj. Ĉio tio ĉi estas tiom da motivoj por ke ni prenu por ni la pacifistajn ideojn, kaj ke ni postulu la kunhelpon, al tiu Laboro, de l' Soverena Pontifiko, riprezentanto de Dio de Paco; sed tio, ne estas motivo, por ke ni ne sekvu kun intereso, kaj eĉ kun simpatio, ĉiun penon faritan en tia direkto.

En 1899, kiam Leo XIII-a eksciis, ke lia riprezentanto ne estus akceptata en la kongreso, ĉu li ĉesis de tiam interesi sin pri la laboroj de l' kunveno? Tute. Kun multe da takto li volis ignori la bracon, kiun la suspekt-

ema Italujo faris pri tiu afero, kaj pensi nur pri sia misio paciganta. En diskorso al la kardinaloj, la 11-an de aprilo, li prenis, por tiel diri, sub sia protekto la Konferencon de Paco : « Igi pli kaj pli malofta kaj sangoverŝiganta tiun teruran milit-ludon — li deklaris — kaj prepari tiel la vojojn por sociala vivo pli trankvila, estas entreprenoj, kiu briligos en la historio de la civilizacio tiun, kiu havis la inteligentecon kaj kuragon fariĝi iniciatinto, de ĝi. Ni salutis lin, de l' komenco, kun la zelo kiu taŭgas en tia cirkonstanco, al tiu, kiu havas la superegan mision iniciati kaj diskonigi sur la tero la dolcajn virtojn de l' Evangelio. Kaj ni ne ĉesas esprimi dezirojn por ke la rezulto respondu, larĝe kaj ĝenerale, al ĝiaj altaj intencoj. »

Tiuj paroloj kaj tiu ekzemplo sendube pezas pli ol la paroloj de kelkaj skeptikaj ĵurnalistoj. Kaj, ne estis neutila — ni kredas — ilin rememorigi al tiuj, kiuj forĵetas iajn ideojn, kaj kiuj eĉ ilin kontraŭbatalas tuj kiam ili vidas ilin mask-vestitaj de kontraŭuloj. J. DUROUX.

El *L'Action Franciscaine*, feb. 1908, tradukis  
ARY-BOURG.

## LA SALUTO AL MARIO SUR SISILIA ŜIPO

La kapitano eltiris sian poŝhosloĝon, poste rimarkante, ke li ne havas tempon por perdi

— La saluton al Mario, diris li laŭte.

Je tiuj vortoj ĉiu eleris el la kajutoj kaj alkuris sur la ponton. Multaj, sendube, jam komencis la Anĝelan saluton, sed tuj ĉiu interrompis sin por partopreni la ĝeneralan preĝon.

En tuta Italujo, tiu preĝo, kiu okazas ĉe solena horo, finigas la tagon kaj komencigas la nokton. Tiu krepuska momento ĉie plenigata de poezio, sur la maro ankoraŭ pligrandiĝas per senfina sankteco.

Tiu mistera vastegeco de l'aero kaj de l'ondoj, tiu profunda sento de l'homa senforteco, komparata al potencega povo de Dio, tiuj mallumaj, kiuj alproksimiĝas kaj dum kiuj la danĝero, ĉiam ĉeestanta, ankoraŭ pligrandiĝas, ĉio inklinas la koron al religia melankolio, al sankta konfido, kiu altigas la animon sur laflugiloj de l'kredo. Precipe tiun vesperon, la danĝero el kiu ni ĵus estis eltirataj, kaj kiun memorigis al ni, tempo post tempo, ondego aŭ malproksimaj muĝadoj ĉio inspiris al la maristaro kaj al ni pian atenton. Ĵus kiam ni kuniĝis sur la ferdeko, la nokto ekdensiĝis oriente; la montoj de Kalabro kaj la pinto de l'promontoro Pelu (1) perdis sian belan bluan koloron, kaj malheliĝis en koloro dubegriza, kiu ŝajnis malsupreniri el la ĉielo, kvazaŭ cindra pluveto estis falinta el ĝi; dum okcidente, iom dekstre de l'insularo Lipario, kies insuloj kun formoj strangaj reliefe aperis sur fajra horizonto, la suno, larĝigita kaj strekita per longaj violkoraj strioj, ekmontris la randon de ĝia disko sur la Tirena maro, kiu brileganta kaj movema ŝajnis fluigi ondojn el fondita oro.

Tiam, la piloto sin levis post la kajuto, prenis en siaj brakoj la filon de l'kapitano kaj genufleksiĝis lin sur la estrado formita de l'kajuto, kaj forlasante la direktilon kvazaŭ la ŝipo estis sufiĉe gvidata de la preĝo, li subtenis la infanon por ke la marrulado ne perdigu al li la ekvilibron. Tiu stranga grupo tuj reliefiĝis sur orumita fono, simila al pentraĵo de Giovanio de Fiezolo aŭ de Benozo Gozoli! Per voĉo tiel malforta ke ĝi apenaŭ alvenis al ni, kaj tamen supreniris al Dio, la infano ekkomencis la Virginan preĝon, kiun aŭskultis la maristoj surgenuitaj, dum ni estis klinitaj.

Jen memoroj pri kiuj la peniko estas mallerta kaj la plumo nesufiĉa; jen pentraĵo pri kiu rakonto ne estas direbla, kaj nenia sceno refarebla, ĉar ĝia graveco estas tute en la profunda sento de l'aktoroj, kiuj plenumis ĝin.

---

1. Nun promontoro *Pero*.

Por leganto de vojaĝoj aŭ amanto de marpentraĵoj, tio estos nur infano kiu preĝas, homoj kiuj respondas kaj ŝipo kiu surnaĝas ; sed por iu, kiu estos ĉeestinta similan scenon, tio estos unu el la plej belegaj spektakloj, kiujn li estos vidinta, unu el la belegaj rememoroj, kiujn li estos konservinta, tio estos la senforteco kiu preĝas, la grandegeco kiu rigardas, kaj Dio kiu aŭskultas.

Trad. ELEDA.

(El *Speronare*, de CHATEAUBRIAND.)

## DUELO ANTAŬ LA FORTEPIANO

### INTER LISZT KAJ CHOPIN

Al la tre klera Esperantistino  
Sinjorino J. Paris, tiun modestan  
tradukon dediĉas la tradukistino.

Ian vesperon de l' monato majo, inter la dekunua kaj la noktomezo, la ĉeestantaro estis kunveninta en la granda salono. La larĝaj fenestroj estis malfermitaj, estis bela lunbrilo, la najtingaloj kantis, penetranta parfumo el rozo kaj resedo eniĝis de tempo al tempo en la ĉambbron.

Liszt (1) ludis ian Nokturnon el Chopin kaj laŭ sia kutimo ĝin fantaziigis, miksante triolojn, tremolojn kaj punktojn orgenajn, kiuj ne estis en ĝi. Kelkajn fojojn, malpaciencajn signojn Chopin (2) estis elmontrinta ; fine ne sin detenante plu, li alpaŝis fortepianon kaj diris al Liszt kun sia angla flegmo

— Mi vin petas, kara mia, se vi faras al mi la honoron ludi unu mian muzikaĵon, ludu tion, kio estas verkita aŭ ludu alion estus nur Chopin, kiu rajtas ŝanĝi Chopin.

1. Liszt naskiĝis en Reidin (1811) kaj mortis en Bayreuth (1886).

2. Chopin naskiĝis la 8-an de februaro 1810 en Zelazova-Vola apud Varsovio kaj mortis la 17-an de oktobro 1849 en Paris. Lian korpon oni enmetis en ĉerkon plena je rozoj ! . . .

— Nu, ludu mem! diris Liszt, starigante iom kolereta.

— Volonte, diris Chopin.

En la momento mem, la lampo estingiĝis de sturna faleto, kiu venis bruligi siajn flugilojn. Oni volis ĝin reekbruligi.

— Ne, ekkriis Chopin, kontraŭe, estingu ĉiujn kandel-ojn; al mi sufiĉas la lumbrilo.

Tiam, li ludis... tutan horon li ludis. Al vi diri kiamaniere, tion mi ne volas provi. Estas kortuŝeco; kiujn oni sentas kaj kiujn oni ne povas esprimi.

Por lin aŭskulti la najtingaloj silentiĝis, kiel dian roson la floroj trinkis tiujn sonojn venintajn el la ĉielo; en silentega entuziasmo l' aŭdantaro kuraĝis apenaŭ spiri kaj, kiam finiĝis l' ensorĉo, ĉiuj okuloj estis malsekaj de ploroj, precipe tiuj de Liszt.

Li ĉirkaŭprenis Chopin, ekkriante

— Ho, amiko mia, vi estas prava! La verkoj de genio kiel la via estas sanktegaj; estas trouzo tuŝi al ili. Vera poeto vi estas, kaj nur ĉarlatano mi estas.

— Ho, ne! diris vive Chopin, ni ambaŭ havas nian manieron. Jen estas ĉio. Vi bone scias, ke neniu en la mondo povas ludi kiel vi Weber kaj Beethoven. Mi vin petegas, por ni ludu l' adaĝon en cis moltono el Beethoven, sed tion faru serioze, kiel vi scias ĝin fari, kiam vi volas.

Per la plej granda sentemo, Liszt ludis tiun adaĝon. Tiam, en l' aŭdantaro, alia malsama kortuŝeco montriĝis; oni ploris, oni ploregis, sed tio ne estis plu dolĉaj larmoj, kiujn Chopin igis flui: estis suferigantaj ploroj, pri kiuj parolas Othello. La melodio de l' dua artisto ne kviete eniĝis la koron, subite ĝi interniĝis kvazaŭ ponardo. Ne estis elegio, estis dramo.

Tiun ĉi vesperon, Chopin tamen kredis, ke li superis Liszt. Li pri tio fanfaronis, dirante « Kiel ĉagrenata li estas! » Liszt eksciis la vorton kaj sin venĝis, kiel artisto sprita, kia li estis. Jen estas l' afero, kiun li elpensis post kvar aŭ kvin tagoj.

Je la sama horo, tio estas ĉirkaŭ noktmezo, la ĉeest-



antaro estis kunveninta. Liszt petegis Chopin, ke li ludu. Post longa ŝanceliĝo, Chopin konsentis. Tiam Liszt petis, ke oni estingu ĉiujn lampojn, ĉiujn kandelojn kaj ke oni mallevu la kurtenojn, por ke plena estu la senlumeco. Tio estis artista kaprico, kion li volis, tion oni faris. Sed en la momento, kiam Chopin estis tuj sidiĝonta antaŭ la fortepiano, Liszt al li diris mallaŭte kelkajn vortojn kaj lin anstataŭis. Chopin, kiu tute ne divenis, kion lia kamarado volis fari, senbrue sidiĝis sur proksiman seĝegon. Tiam Liszt ludis precize ĉiujn verkaĵojn, kiujn aŭdigis Chopin en la memorinda vesperkunveno, pri kiu ni parolis, sed per tiel mirinda imitado de l' stilo kaj ludmaniero de sia konkuranto li sukcesis ilin ludi, ke estis ne eble, ke oni ne eraru, kaj efektive ĉiuj eraris.

La sama ensorĉo, la sama kortuŝeco renoviĝis. Kiam l'entuziasmo estis en la plej alta grado, rapide Liszt frotis alumeton kaj ekbruligis la kandelojn de l' fortepiano. Ekkrio de mirego okazis en la kunveno.

— Ho ! estas vi !

— Kiel vi vidas !

— Sed ni kredis, ke estis Chopin !

— Kion vi diras pri tio ? diris Liszt al sia konkuranto.

— Mi diras kiel ĉiuj mi ankaŭ kredeis, ke estis Chopin.

— Vi vidas, diris la virtuozo stariĝante, kiam Liszt povas esti Chopin, kiam li volas, sed Chopin, ĉu li povus esti Liszt ?

Tio estis vetbatalo, sed Chopin ne volis aŭ ne kuragiĝi akcepti.

Liszt estis venĝita !

Esperantigis SPERANZA.

El *Annales Littéraires* 1898.

## PAĜO DE L' DIREKTOR

**Kial ankoraŭ ne aperis *Lando de Mirakloj* kaj ceteraj anoncitaj libroj ? — La legantoj de E. K. certe tre miras**

pri tio. Jen la kaŭzo de la malfruaĵoj. De preskaŭ kvin monatoj, mia sanstato ne permesas al mi laboron. Malsano subite falis sur mi, kiam mi estis verkinta la *duonon* de *Lando de Mirakloj*. De tiu tempo mi ne povis fini la tradukon, nek zorgi pri la aliaj libroj presotaj. Sed konfidu al Dio, kiel mi plene konfidas, karaj amikoj, kaj vi perdos nenion pro prokrasto.

**Lourdes; grava alvoko de la Direktoro.** — Por la dua fojo mi pilgrimos al Lourdes, por plenfide peti la miraklon de mia resaniĝo. Mi foriros el Tours la 13-an de Julio, kun la Turena pilgrimo, inter la multaj malsanuloj, kiujn oni devos porti aŭ veturi de l'hospitalo al la sankta groto. Mi estos en Lourdes de la 14-a de Julio ĝis la 17-a. El mia tuta koro mi petas la plej fervorajn preĝojn de la legantoj de E. K. por la resaniĝo de ĝia Direktoro. Tiam mi povos plimeti ĉapitron al *Lando de Mirakloj*, por la plej granda gloro de Dio kaj de Nia Sinjorino.

**Kongreso; Katolikaj kunvenoj.** Ni altiras la atenton de niaj amikoj al la katolikaj kunvenoj, kiuj okazos dum la Dresden'a Kongreso. La organizado, sub la direkcio de eminenta kanoniko Pichot, estos perfekta. Ni devas fari grandan *praktikan progreson*, dum tiuj kunvenoj. Estas do necese, ke la sekretarioj de niaj diversaj Societoj ricevu *multajn respondojn* al la demandoj jam presitaj en E. K. La respondoj povas esti mallongaj, sed *precizaj kaj praktikaj*.

**Notu Bone.** — La katolikoj devas konsideri kiel *tre gravajn* la kunvenojn en Dresdeno. Ili devas ĉeesti en granda nombro kaj eĉ sin ĝeni iom por ne lasi malplena la ĉambreĝon de la kunvenoj, Ni rimarkigas, ke kanoniko Pichot estas *Prezidento*, kaj ne nur *Vic-Prezidento* de *Institut de la Paix*, en Monaco, kiel ni erare presis en lasta n-o de E. K.

---

*Ni ricevis de kanoniko Pichot jenaĝ noton kiun ni plezure enpresas :*

**Avizo** al la katolikaj esperantistoj pri la Dresdena

kongreso. — La Komitato Katolika dum la Dresdena Kongreso estas jam starigita. Jen la nomoj de la komitatanoj

Prezidanto La Respektinda kanoniko Pichot, Prezidanto de la « Institut de la Paix » Monako (Princlando).

Sekretario : Abato Austin Richardson, profesoro en la « Institut St-Louis », Bruselo.

Direktoro por la Diservoj dum la kongreso Pastro Frohns, parokestro de Warstade (Hanovro), Germanujo.

Sekretario de la S. K. I. : Abato Derroite, Parizo.

Sekretario de la P. E. F. Abato Richardson.

La religia diservo, meso kun prediko en esperanto de Abato Pichot, tre volonte permesataj de la Dresdena episkopo, okazos la 16-an de aŭgusto kredindeble en la nova preĝejo de la SS. Koro de Jesuo str. Porsberg. je la duono post la 11-a, aŭ en la preĝejo de S. Josef, granda str. de Plauen, je la duono post la 9-a.

La Katolikaj esperantistoj estos avizataj pli malfrue per alia avizo aŭ per la lokaj gazetoj La preĝejo ne povis ĝis nun esti elektata pro la taŭgeco de la horo. Oni volas eviti la koincidon de la diversaj diservoj. — LA KOMITATO.

## FRATINO EJERIO

Al la sindona kaj simpatia Fraŭlino J. Granier, vic-prezidantino de la Esperantista grupo de Béziers tiun rakonton dediĉas C. DE REY-PAILLHADE.

— Cu ŝi estas do mortinta ?

— Jes, Sinjorino, respondis malalta viro kun nigra vesto.

— Kaj ŝia testamento ?

— La notario tre baldaŭ malfermos ĝin.

— Ĉu ni heredos ?

— Estas kredeble, rajtojn ni havas.

— Kia estas do tiu tiel malbone vestita kreitaĵo, kiu tien venas sin montri?

— Ho! tiu — diris la malalta viro ridante — tre malmulte heredas en la testamento; ŝi estas la fratino de la mortintino.

— Kio! ŝi estas tiu Anno, kiun antaŭ kelke da jaroj delogis sentaŭgulo, oficiro?

— Jes, precize.

— Tre maltime ŝi estas kuraĝi antaŭ respektinda familio sin prezenti ĉi tie.

— Tiom pli — respondis la malgranda viro — ke Fratino Eferio, sanktulino, mirinda virino je sia pieco kaj religio, grandan amon sendube ne havis por ŝi.

— En tiu momento, Anno trairis la ĉambron, kie jam estis kuniĝinta la familio de la mortintino. Ŝi estis pala, plenaj de larmoj estis ŝiaj okuloj kaj ŝia vizaĝo estis jam velkigita per la fruaj sulkoj kaŭzitaj de ĉagreno.

— Kion vi venas fari ĉi tien? — diris al ŝi kun aroganteco Sinjorino de Villeboys, kiu antaŭ nelonge demandis la malaltan viron, heredonton kiel ŝi.

— Sinjorino — kun humileco la malfeliĉa virino respondis — ĉi tien mi ne venas por peti here laĵon, kiu al mi ne apartenas kaj kiun mi ne devas postuli. Mi venas nur paroli kun Sinjoro Dubois, la notario de mia malfeliĉa fratino, por scii ĉu dum sia lasta horo ŝi parolis pri mi, ... ĉu ŝi pardonis al mi.

— Kio! vi volas, ke oni pardonu al vi! — diris arogante Sinjorino de Villeboys — de granda familio vi estas la honto, ĉar kun sentaŭgulo, kun militisto de Bonaparto, kiu eĉ ne estis ankoraŭ via edzo, vi forkuris.

— Kun mi li estus edziĝinta, Sinjorino — respondis Anno — se sur la honora kampo li ne estus mortinta... Por lia memoro, kiu estas al mi kara, kaj kiun mi volas respektigi, tion mi nur diras.

— Kaj vi, ĉu vi volas, ke oni respektu vin, vi kiu patran aŭtoritaton kontraŭstaris, esperante kontrakti edzecon malindan je vi.

— Sinjorino, mi estis kulpa, mi ĝin scias ; sed mi tiom suferis, mi tiom ploris, ke de Dio mi esperis la pardonon... Se, kiel mi, Sinjorino, la malriĉecon kaj suferojn vi estus suferinta, se vi havus kiel mi infanon, kies la estonta destino turmentus vin, kaj kiu de la patrinaj kulpoj ne estas responda, tiam de mia koro por elaceti la kulpojn vi sentus kian kruelan elpagon mi oferis al Dio.

— Kulpon, malsamrangan edziĝon neniu povas indulgi. En tiu momento, respektinda viro, la notario Dubois, sin intermetis.

— Al Anno ĉesu riproĉi eraron, kiun ŝiaj patro kaj fratino al ŝi jam pardonis.

» Sindonan, noblan kaj bonan viron amis Anno, al kiu oni povis nur riproĉi la malriĉecon kaj la nekonatecon de l' nomo. Tamen se li vivus, se la familio estus koninta lin kiel mi, mi lia malnova amiko, Anno estus hodiaŭ feliĉa kaj respektata.

— Sed kial tiu virino estas ĉi tie ?

— Car ĉi tie ŝi devas esti, — diris serioze la notario — mi petis ŝin tien veni.

Tiam okazis la legado de l' testamento.

La notario plilaŭtigis la voĉon

« Mi spirit-korsana, Ejerio de Damfreming, en la religiulina monakejo de la Sanktega Kero de Jesuo, apartigita kiel loĝantino, la jenajn volojn mi diktas kiel la esprimon de mia absoluta deziro kaj de mia testamentó la ĉefan postulon.

« Post mia morto, ĉe mia notario, oni trovos 200.000 frankojn da mono, juvelojn, vestaĉojn kaj meblojn ; mi lasas ankaŭ samvaloran kastelon je 200.000 frankoj.

« En la monakejo, kie mi loĝas, oni trovos nur la Virgulinan Horlibron, sankta libro, kiu estas ankoraŭ tia, kia ĝi estis kiam en la elmigrado mi ĝin kunprenis.

« Per tiuj ĉi objektoj, mi deziras, ke oni faru tri lotaĵojn

« La unua lotaĵo enhavos la 200.000 frankojn da mono ;

« La dua la kastelon, meblojn kaj juvelojn ;

« La tria mian Horlibron.

« Al mia fratino Anno, la ĉagrenon kiun ŝi kaŭzis al ni mi pardonis, kaj en ŝia doloro mi estus ŝin konsolinta se ŝian revenon al Francujo mi estus koninta pli frue. En mian testamenton mi ŝin enskribas.

« Mia tre amata kuzino, Sinjorino de Villeboys, havos la unuan elekton ;

« Mia bofrato, Sinjoto Vatry, la duan ;

« Anno elektos la lasta. »

— Ha, ha ! — diris Vatry — Fratino Ejerio estis bona kaj jen estas spritaĵo.

— Anno havos nur la preĝlibron — diris ridegante Sinjorino de Villeboys.

La notario interrompis la ridantaron.

— Sinjorino, — diris li — kiun lotaĵon vi deziras !

— La 200.000 frankojn da mono.

— Je tio vi estas tute determinata ?

— Sen ia dubo.

La notario, al la sentemo de tiu virino sin turnante, diris al ŝi :

— Sinjorino, riĉa vi estas kaj nenion havas Anno ...ĉu tiun lotaĵon vi ne povus lasi al ŝi kaj preni tiun preĝlibron, kiun la strangeco de la mortintino kun la aliaj partoj volis egaligi ?

— Ĉu vi ŝercas, Sinjoro Dubois ? — ekkriis Sinjorino de Villeboys — Tre malmulte sagaca vi devas esti, se en ĉi tio vi ne rimarkis la intencon de Fratino Ejerio, nia tre honorinda kuzino... Ŝi scias, ke al Anno, kiu estas elektonta laste, estos aljuĝita la heredaĵo de la preĝlibro.

— Kaj kion vi konkludas pri tio ? — ekkriis la notario.

— Mi pensas, mi pensas... ke al sia fratino ŝi volis diri ke, en tiu mondo, la solaj helpoj, kiujn ŝi devos esperi, estos la pentoj kaj la preĝoj.

Elparolante tiujn ĉi vortojn, Sinjorino de Villeboys definitive elektis la monfortunon.

Kiel oni pensas, la kastelon kaj ĝian meblaron postulis Vatry.



— Sinjoro Vatry, — diris ankoraŭ Sinjoro Dubois — eĉ supoze ke sian fratiron intencis puni la mortintino, noble estus al vi, milionulo, al Anno kiu tiun heredaĵon tre bezonas, forlasi parton de via lotaĵo.

— Pri viaj bonaj konsiloj dankon, mia kara, — diris Vatry; — apud la rando de miaj arbaroj troviĝas la kastelo, kiu tre taŭgas al mi, tiom pli ke la meblojn ĝi enhavas... Rilate al la juveloj... de Eferio... ili estas memoraĵoj, kiujn neniam oni devas cedi.

— Tial ke ĝi estas tiel, — diris la notario — jen, mia malfeliĉa Sinjorino Anno, la Horlibro kiu restas al vi.

Anno, sekvata de sia filo, bela knabo kun lazurokuloj, prenis la Horlibron de sia fratino kaj kisinte ĝin

— Jen, Hektoro, de via malfeliĉa kaj mortinta onklino kisu bone tiun libron,... ŝi tre amus vin, se ŝi estus koninta vin... kaj kiam vi scios legi. Dion vi preĝos por ke li faru vin saĝa kaj bona, kiel estis via patro... kaj pli feliĉa ol via malfeliĉega patrino.

Vole nevole de ĉiuj ĉeestantoj la okuloj pleniĝis je larmoj.

Sur la malnovan volumon almetis siajn rozkolorajn lipojn la infano kaj, tuŝante la fermilon, li ĝin malfermis.

— Ho! patrineto, — ekkriis li — kiom da belaj bildoj!

— Vere? — diris la patrino, feliĉa pro la ĝojo de sia amegata fiio.

— Jes. Kun ruĝa robo, la bona Virgulino en siaj brakoj tenas la Infanon Jesuon... Sed kial, patrineto, inter la foliojn oni metis silk-paperon?

— Por ke ne difektiĝu la bildoj...

— Sed, patrineto, kial do oni enmetis ses silkajn paperfoliojn sur ĉiu gravuraĵo?

La patrino rigardis... teruran krion ŝi ekfaris kaj falis en la brakojn de Sinjoro Dubois, la notario, kiu al la ĉeestantaj personoj diris

— Lasu do, ĝi estas nenio, oni ne mortas pri tio.

— ...Ci, bubo, — aldonis li, de la manoj de Hektoro prenante la preĝlibron — tion donu al mi, ci ŝirus la bildojn.

Farante mil rimarkojn pri la sveno de Anno kaj la kompato, kiun la notario elmontris por ŝi, la heredantoj eliris.

Annon kaj ŝian filon ili renkontis la postan monaton, ambaŭ samtempe simple kaj riĉe vestitaj, promenantaj en bela kaleŝo kun du ĉevaloj.

Ili petis informojn kaj eksciis, ke Sinjorino Anno dom-egon je 180.000 frankoj ĵus estis aĉetinta, kaj ke ŝia filo posedis por ĉiuj sciencoj profesorojn.

Kiel tondro falis sur ilin tiu informo.

Iun matenon, Sinjorino de Villebois kaj Sinjoro Vetry iris ĉe la notario.

En sia laborĉambro laboris la bona Dubois.

— Eble ni malkvietigas vin? — diris la aroganta sinjorino.

— Tute egale... la ŝtatan rent-aĉetaĵon faritan de Sinjorino Anno mi estis redaktanta.

— Kiel! — ekkriis Vetry — veurilon aĉetinte kaj aranĝinte sian hotelon, por procento doni ŝi havas ankoraŭ monon!

— Sendube.

— Kaj de kie venas la mono?

— Kiel! vi ne sciigis pri la deveno de la fortuno?

— Kiam?

— Kiam rigardante la Horlibron, kiun ŝi heredis, ŝi eklaŭtigis krion.

— Nenion ni aŭdis kaj vidis.

— Ho! mi kredis, ke tion vi sciis — diris la ruzeta notario.

« Sesdek gravuraĵojn enhavis la Horlibro, kaj per ses bankbiletoj je mil frankoj estis rekovrita ĉiu gravuraĵo.

— Dio granda! — diris Vetry, fulmofrapata.

— Se mi estus sciinta! — ekkriis Sinjorino de Villebois.

— La elekton vi havis — aldonis la notario — kaj mi mem invitis vin preni la preĝlibron, sed vi rifuzis al mi.

— Trovi riĉecon en breviaró estas ankaŭ tre strange.

— Jen la klarigo Fraŭlino Ejerio de Domferming, la

mortintino, la mizeron tre suferis dum la emigrado, kaj ĉiaokaze se duan fojon ŝi devus forlasi sian pian rifuĝejon, en sian Horlibron ŝi kaŝis la solan posedaĵon, kiun oni respektis antaŭe. sendependan riĉecon.

Kun la furiozo en la koro eliris la heredantoj.

Sinjorino Anno loĝas ankoraŭ en Parizo..

...Se dum bela somera vespero vi pasos sur la straton Laffitte, ĉe la unua etaĝo, lumigitan de la palaj rebriloj de vaks-kandeloj vi vidos ĉarman pentraĵon...

Virinon kunmetantan la manojn de sia filo, sesjara, blonda knabo, malfermanta la malnovan Horlibron, kiu posedas nun oran ingon.

— Preĝu por mi, infano — diris la patrino.

— Kaj por kiu ankoraŭ? — diris la knabo.

— Por via patro. via kompatinda patro, mortinta ne povante vin ami kaj koni...

— Ĉu mi devos preĝi la sanktulon, mian patronon?

— Jes. amiketo mia sed sanktulincn, kiu de la ĉielo ekvidas nin ne forgesu; ŝi ridetas en la nuboj al la kulpa virino, al kiu ŝi pardonis.

— Kiel estas nomata tiu sanktulino, patrincto?

Tiam la blondan kapon de sia filo superverŝante per larmoj, la patrino respondas

— Ŝi estas nomata... Fratino Eferio.

LEO LESPÈS.

El la franca lingvo tradukis

C. DE REY-PAILHADE.



## NEKROLOGIO

Oñi legas en *British Esperantist* (julio)

« Kun tre profunda malĝojo ni ĵus eksciis pri la bedaŭrinde frua morto de nia amiko kaj kunlaboranto, S-o Rupert Temple Fanshawe, Distrikta Policestro, Raipur, Centraj Provincoj, Hindujo, je la aĝo de 32 jaroj. Multaj el tiuj, kiuj ĉeestis la

Kongreson en Cambridge, tre bone rememoros lin kaj lia fervorecon por nia afero. La lastajn du jarojn li estis okupata pri la preparado de verko, kiu estos sendube trege utila por Esperantistoj, *Konkordanco de la Fundamenta Krestomatio*. Li estis la dua filo de Sir Arthur Fanshawe. K. C. I. E., al kiu ni sendas la esprimon de nia sincera kondolenco. »

Ni ne scias, ĉu S-ro Fanshawe estis katoliko. Tamen li estis abonanto de E. K. Ni petas niajn legantojn, ke ili bonvolu diri *De Profundis* (*Katolika Preĝaro*, p. 8) por lia animo.

— S-o Eduardo Magnier, patro de nia fervora abonantino, Fraŭlino Valentine Magnier, Boulogne-s-Mer, Franci. — *De Profundis*.

## KELKAJ FLOROJ SOCIALAJ



— El la vivo de vilaĝpastro. —

### I. EL LA UNĜAJ PASTRA-JAROJ.

— Vagonareto, kiel oni legas en libroj !

— Ĝuste. Ĝi donas tempon al la vojaĝantoj, por admiri niajn belajn arbarojn kaj kampojn.

— Jes, ili estas tute ne malbelaj, eĉ idealaj mem. Mi esperas, ke mia estonto tie ĉi ne estos malpli bela.

Sur la plataĵo de vagono de la vilaĝvagonaro de A. al M. staris du sinjoroj, kiuj ĉirkaŭrigardis en la suna mateno kaj interparolis. La starado tie estis malpermesita de la fervojregularo ; sed tiel precize oni ne kalkulis sur tiu-ci vilaĝvagonaro kaj la kondukisto tute nenion diris, kiam li tie trovis Sinjoron Vogt, la junan kuraciston de sia vilaĝo. La juna kuracisto estis irinta renkonten al la amiko de sia juneco, la « nova vikario », kiu estis dorminte en A, ĉar li ne volis alveni vespere en lia nova paroko.

Li estis ankoraŭ tro juna. Nur antaŭ 8 tagoj li estis

farinta sian unuan Sanktan Meson, kaj nun li iris kun gaja espero kaj sankta fervoro al sia nova laborkampo. Li estis duoble ĝoja, ĉar sia amiko el pli junaj jaroj, kun kiu li estis travivinta sian unuan studadtempon, loĝis tie kiel kuracisto.

— Mia Paŭlino miros pri vi, interrompis la kuracisto la malgrandan silentecon, ĉar ŝi konis vin en via juneco.

— Jes, sed kiel multe estas ŝanĝita en tiu intertempo! Vi estas nun kuracisto kaj mi pastro.

Tie montriĝis la preĝejturo de M. Ĝi rigardis el la monteto malsupren sur la ĉirkaŭ 100 domoj kaj dometoj. La pastro rigardis ekzamene la vilaĝon, kiu aperis antaŭ siaj okuloj.

— Ĉu tio estas la tuta vilaĝo? subite li diris, iom maltrankvile.

— Jes, la vilaĝo mem kalkulas ĉirkaŭ 1000 loĝantoj. kaj la aliaj 1.000 estas dividataj en la 50 aŭ 60 vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo. Vi longe kaj multe devos marŝi dum la vizitado de viaj malsanuloj.

La vagonareto malrapide eniris la vilaĝon. La edzino de la kuracisto kaj la parokestro ricevis niajn du vojaĝantojn. La juna virino donis la manon al la nova pastro; oni ĝin povis rimarki ĉe ŝi, ŝi ne bone sciis kiel teni sin en la nova situacio. Por la unua fojo ŝi nun vidis la estintan studenton en la honorinda nigra vesto.

— Ne miru, edzino mia, ridis la kuracisto. Estas la sama bona amiko de l'estinto. Sole li estas nun iom pli serioza, se tio estas ebla.

Nun la maljuna pastro antaŭeniris. « Estu bonvena, juna amiko, en mia paroĉo. » Afable, sed memscie sonis tiu voĉo. Por la unua fojo ili vidis sin reciproke, ili, kies viv-vojoj en la estonto irus flanken. Momenton ili rigardis sin atente. « Mi dankas vin, sinjoro parokestro, diris la juna pastro.

Bona volo kaj modesteco parolis per tiu ĉi respondo. La parokestro estis kontenta.

— Kvar semajnoj jam pasis! Kiel rapide do iras la

tempo, kiam oni estas feliĉa ! »

Jen la pensoj, kiujn oni povis legi sur la gaja mieno de la juna vikario, kiam li antaŭ sia malfermita fenestro rigardis la belan naturon.

Li ĝuste revenis de l'altaro, tiu sankta loko, kie la pastro ĉerpas tiom da forteco, kuraĝeco, gajeco kaj amo, necesaj por lia ofico. La pastrejo kuŝis proksime al la preĝejo kaj ankaŭ tie oni havis belan vidon sur la vilaĝo, kies ruĝaj tegmentoj prezentis pentrindan vidaĵon.

— *Laudate Dominum de coelis, laudate eum in excelcis.*

Senvole la juna pastro kantis tion en sia animo. Beata sento plenumis sian koron, la sento kiu memorigas en sia pureco kaj dolĉeco la pacon kaj ĝojojn de la Unua Sankta-Komunio.

Tie alvenis de la ĉie kuŝantaj vilaĝoj knaboj kaj knabinoj, kies vojo kondukis ilin preter la preĝejo al la lernejo. Are ili alvenis al la vilaĝo. Parto de la infanoj portis branĉetojn de mirteloj, eble por silente frandi en la lernejo. Unu el la knaboj, freŝulo kun ruĝaj vangoj kaj vivaj okuloj forlasis siajn kamaradojn kaj staris post kelkaj paŝoj antaŭ la fenestro de la mirita pastro.

— Sinjoronklo (1), ili estas tute freŝaj, vi devas ilin manĝi iam !

Li levigis belan branĉeton. Sed nune rapidege alvenis ĉiuj.

— La miaj ankaŭ ! kriis ili, la miaj estas pli grandaj kaj pli belaj ol la liaj !

Kion fari ? Ili staris antaŭ li kun etenditaj braketoj, prezentantaj aron de branĉetoj. Kaj malantaŭ tio la infanmieno, kun okuloj nigraj kiel la mirteloj mem, aŭ bluaj kiel la ĉielo super ili, de kie la suno faris tiujn freŝajn mienojn ankoraŭ pli afablaj kaj brilaj.

Sed infanoj miaj, mi ne povas manĝi ĉiujn tiujn miĝtelojn ! Ĉiu el vi donu al mi duon, kaj tiam mi donos al vi ĉiuj ankaŭ ion !

---

1. Tiel oni nomas vikarijon en Holando.



Baldaŭ la fenestra benko estis tute kovrita per mirtel branĉetoj. Per gravuretoj de sanktuloj li rekompencis la etajn donintojn, kiuj tiam en granda gajeco foriris.

(*Sekvo venos.*)

Tradukis HOLLANDANO.

## LIBROJ EN AŬ PRI ESPERANTO

*Sub la Neĝo.* Taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro. De J.-J. Porchat. Verko kronita de la Franca akademio. Esperantigis J. Borel. Speciale verkita por lernantoj, kiuj komencas la studon de Esp. Stilo perfekte klara kaj facila. Egalas la stilon de D-ro Bein (Kabe). 144 p. Prezo 1 fr. 25 (50 Sm). Moller kaj Borel, Berlin.

*La kvar Evangelioj kunigitaj en unu rakonto.* Trad. P-o R. Laisney. 196 p. 1 fr. 50. Hachette et Cie, Paris.

*Frazlibro por Esperantistoj en Kopenhago.* Trad. Fred. Skeel-Giorling. Publikigita de l'firmo *Carlsberg Bryggerierne* (Bierfarejoj de Karlsberg), 32 p. formato de ŝlosiloj Ĉefeĉ.

*Weiserhirsch.* Senpage ricevos la belan broŝuron pri la Esperanta vilaĝo ĉiu, kiu sendos la poŝt-pagon (internacia respond-kupono) al D-ro Shramm, Standehaus, Dresden.

*Slovakoj kaj Magiaroj.* De H. K. Bouška. N-o 1-a el kolekto « Informaj broŝuroj de Esperantista Konsulejo en Praha ». Librejo Vaclav Riegel, en Praha-II-1687, Bohemujo-Aŭstrio. Prezo 0 fr. 55. — Ni intencas reparoli pri tiu ĉi tre grava libreto.

*Progreso.* N-o de junio. 72 paĝ. Librejo Delagrave, 15, rue Soufflot, Paris. Unu numero, 50 centim.

*Europa Kristana Celado,* estas nun redaktata Angle kaj Esperante. Eldonejo : S. Ch. Briquet, 4, Cité, Genevo. Jarabono : 0 fr. 75 Sm.

*Theosophic Messenger.* Junia N-o, havas notojn favorajn al Esperanto, Chicago (Angle redaktita).

*The Esperanto News* (majo), Angle kaj Esperante. Eldonejo : The Esperanto News Company, 10, Wall Street, Room 510, New-York City.

*Franca Guidlibreto,* en *Linguo Internaciona* (Ido). 20 p.

Resumo de gramatiko ; 2.000 plej uzataj radikoj. 10 ekz.: 1 fr. 100 ekz. : 8 fr. Librejo Chaix, 11, boulev. St-Michel, Paris. — Sama broŝuro en *angla* kaj *germana* lingvoj.

## PROMENADO TRA GAZETOJ

*The American Catholic Quaterly Rewew* (aprilo). 200 paĝoj en granda formato. Philadelphia (Usono). Plej rimarkindaj artikoloj : La situacio en Irlando, Rev. J. Mc Dermot ; Kurioza herezio, Rev. Simon Fitz-Simons. Rimarkinda studo pri encikliko kontraŭ *Modernismo*. La encikliko estis forté atakata, en Usono, de du partioj : la tradiciemaj Protestantoj, kaj la partio protestanta, « kiu jam plene cedis al la ĉarmoj de *modernista* filozofio ». Alia solida kaj serioza partio Protestanta akceptis la Enciklikon kun ĝojo kaj « rekonis unu fojon plie, ke la Papeco estas la potenca bulvardo de Kristaneco ». — La reviviĝo de studoj en la 18-a jarcento Rev. Leslie J. Walker, S. J. — Dante kaj Goëthe ; ilia filozofio : Rev. E. J. Byrne.

*Revue du Clergé Français* (Majo 1-a). — Ikonografio de la patrineco de Virg. Mario : J.-C. Broussolle. — Scienca kroniko : Okultismo de hieraŭ : L. Wintrebert. Analizo plej interesanta de l'libro de tre kompetenta Dr. Grasset, la plej scienca kaj plej bone informata verko pri tiuj demandoj.

— (Majo 15-a). — Historio de l'Ekleziaj ordonoj : 5-a ordono : A. Villien. — Kroniko de l'teologia movado en Franclando de 15 jaroj : H. Leduc.

*Le Sillon* (14 junio), ĵurnalo de junaj demokratoj, leginda pro ĝia sincereco, anoncas konferencon de kamarado Claudius Colas pri : *Esperanto et Sillon*. Ni esperas ricevi de nia amiko informojn pri la rezulto de tiu konferenco. Ni ankaŭ scias, ke S. Colas intencas skribi specialan artikolon por la gazeto *Le Sillon* (La Sulko).

*L'Action Franciscaine* (Majo). — La demando pri servistoj : J. Duroux. Tre sprita kaj serioza artikolo. — Sociala kroniko : M. Delorme.

*Annales de N.-D. de Lourdes* (Majo). — Raportas detale pri la multegaj pilgrimoj, kiuj venas el ĉiuj partoj de l'mondo. Dum majo : M-ro de Szeptice-Szeptyki, ĉefepiskopo Grek-Rutena de Lemberg (Galicio) ; lia Alta Moŝto Princo J. de Saxe ; Fra-

tino de l'Prezidento de Peruo; pilgrimoj Ita'aj, Hispanaj, Svisaj, Rumanaj, kc.

La katolikoj nepre bezonus havi centron Esperantistan Informejon, en Lourdes. Ni rekomendas tion al la Prezidanto de katolikaj kunvenoj en Dresden.

*Annales apostoliques des PP. du St-Esprit. (Junio).* — Bonega artikolo de Grafino Th. Ledochowska, pri la helpo, kiun la junulinoj, povas doni al misiistoj, restante en la mondana vivo, aŭ fariĝante membro de l'Societo *St-Pierre Claver*. Tiu societo, kiu havas rilatojn kun misiistoj el ĉiuj lingvoj devus uzi la lingvon internacian. *Niaj amikoj misiistoj devos klopodi por tio.*

*Franc-Maçonnerie démasquée* (io majo). — Kroniko pri fremda Framasonaro: « F. . Quartier-la-Tente volas nepre la universalan fratecon de ĉiuj Framasonaroj en la mondo... » Sed estas obstaklo: La Granda Oriento de Franclando. Oni scias ke tiu ĉi estas kondamnita al l'*Indekso de l'Internacia Ofico* por masonaj interrilatoj, en Neuchâtel. La kaŭzo estas, ke la Gr. . Or. . Franca ne kredas plu en Dio. Tio pruvas, ke ekzistas ia diferenco inter la Francaj Framasonoj, senkompataj malamikoj de Katolikismo, kaj ceteraj Framasonoj.

*Tra la Mondo* (Majo). — La organizo de Germanaj loĝioj; de Ch. Barthel, Prez. de la *Internacia Societo Framasona de Esperantistoj*. « Ekzistas personoj, kiuj vidante la nomon framasono tuj pensas, ke tio signifas kontraŭbatalanton de la Religio; kompreneble ili eraras, almenaŭ rilate la Germanajn loĝiojn al kiuj, male je kelkaj aliaj sistemoj, la okupado pri politiko aŭ religio estas severe malpermesita. »

Feliĉa lando, en kiu la Fram. . estas tiel saĝaj! Samaj reguloj ekzistas ĉe la Francaj Fr. ., sed, ho ve! politiko kaj batalo kontraŭ religio estas la *solaj priokupoj* de la loĝioj...

La enhavo de *Tra la Mondo* estas ĉiam tre bele ilustrata, kaj la « familia gazeto » estas plej rekomendinda. La gazeto ĉiam amike rekomendis E. K. Ni plezure faras samon por ĝi apud niaj legantoj.

Ni rekomendas al niaj legantoj *Esperanta Internacia Revuo*, publikigita de nia amiko. A. de Marich (Budapest, Ulloi-ut. 59). Ĝi estas tre praktika gazeto « industria, komerca, eksporta, filatelia, reklama, kaj literatura ». Jare 2 Sm. 08. — Plej bonan sukceson ni dizeras al nia nova kunfrato.

C. DE LA ROCHE.

## SAKOJ

Sub la redakcio de S-o AL. WAGNER, STANISLAU, 2. Aŭstrujo.

## Ludo XXI-a

La defendo duĉevala.

(El nia koresponda ŝakturniro).

Blanko

Nigro

S-o A. Nissen


D-o G. Mailard

- |               |              |
|---------------|--------------|
| 1. S — 4R     | S — 4R       |
| 2. C — 3KR    | C — 3KD      |
| K — 4K        | C — 3KR      |
| 4. C — 5CR    | S — 4D       |
| 5. S × S      | Ĉ — 4TD      |
| 6. K — 5C (ŝ) | S — 3KD      |
| 7. S × S      | S × S        |
| 8. K — 2R     | S — 3TR      |
| 9. C — 3KR    | S — 5R       |
| 10. C — 5R    | D — 5D       |
| 11. S — 4KR   | K — 4KD      |
| 12. T — 1K    | D — 1D       |
| 13. S — 3KD   | C — 4D       |
| 14. S — 4CD   | D — 5TR (ŝ)  |
| 15. S — 3CR   | D × ST       |
| 16. D — 4TD   | K — 6TR      |
| 17. S — K     | K × T        |
| 18. K × K     | D × SC (ŝ)   |
| 19. R — 2R    | C × S4KR (ŝ) |
| 20. R — 1D    | D — 8Ĉ       |
| 21. D × C     | D × K (ŝ)    |
| 22. R — 2K    | S — 3KR      |
| 23. Ĉ × S     | D — 6D (ŝ)   |
| 24. R — 2C    | S — 4T       |
| 25. C — 4CD   | D — 8K       |
| 26. C — 3T    | Reĝsaltas TR |

## Problemo XXI-a

Komponis A. Charlick  
Rose-Park.

Nigro : 5 pecoj.



Blanko 6 pecoj.

Mortigo en 2 iroj.

- |                |  |
|----------------|--|
| 27. S — 4D     | S × S traillante                         |
| 28. K × C      | D × K                                    |
| 29. S — 6K     | S — 3C                                   |
| 30. D — 5D (ŝ) | R — 2C                                   |
| 31. D × S3D    | S — 4TD                                  |
| 32. C — 5D     | TiT — 1C (ŝ)                             |
| 33. C3T — 5Ĉ   | D — 7KR (ŝ)                              |
| 34. R — 3C     | S — 5TD (ŝ)                              |
| 35. R × S      | D — 7CD                                  |
| 36. D — 4D.    | La nigro anoncas mortigon post tri iroj. |

## Kongreso.

Dum la kongreso, la ŝakludantoj povas renkonti por kunludi en la kafejo Konig, Waisenhausstrasse. Oni provizore aranĝis la ĉiujaran kunvenon de la anoj de la societo de Esperantistaj Ŝakludantoj je vendredo la 20-a de aŭgusto. La kafejo Konig estas la sidejo de la Dresdena Ŝakuniĝo.

John ELLIS.

*Sekretario de la Societo de Esperantistaj Ŝakludantoj.*

*Le Directeur-Gérant, EM. PELTIER.*

Presejo de *Espero Katolika*. Sainte-Radegonde (I.-et-L.), FRANCE

---

# L'ŒUVRE DE LOURDES

FRANCA VERKO DE D-ro BOISSARIES

— ILUSTRITA PER 60 SIMILIGRAVUROJ —

*Granda volumo in-8; 400 paĝoj. Prezo : 3 fr. 50*

Sub titolo « Lando de Mirakloj », kun permeso de l' aŭtoro kaj de l' eldonisto, baldaŭ aperos ekstraktoj de tiu rimarkinda libro, publikigata okaze de l' 50-a dat-reveno de l' Aparicioj de Lourdes.

Aĉetebla ĉe *Espero Katolika*. Sendu monon kun la mendo.

---

## COURS ÉLÉMENTAIRE D'ESPERANTO

Publié dans *Les Langues Vivantes*

PAR

Em. PELTIER, Dir. de E. K.

GRAMMAIRE — EXERCICES — PHRASÉOLOGIE — CONVERSATIONS

*Prezo : 0 fr, 30 ; (afrankite 0 fr. 35)*

---

## MUZIKAJOJ DE S-ino JOSÉE GUIVY

Ho, Mia Kor', poezio de D-ro Zamenhof	1 fr.
En Songô, poezio de D-ro Zamenhof.	1 fr. 60
Birdoj, forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i>	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine	1 fr. 60
Hmno, poezio de P-o A. Dombrovski.	1 fr. 25

---

### Franca Literaturo. — Profitindaj okazoj !!!

Interesantaj, mult-ilustritaj libroj binditaj. — En librejo, oni vendas ĉiun el tiuj libroj po 2 frankoj plie.

<i>Les Robinsons Suisses</i> , par J. Gros, 3-a eldono (30 × 20)	Fr. 5 50
<i>Une Française au Pôle Nord</i> , par Pierre Mael (28 cm. × 18)	3 50
<i>L'Héritage de Marie-Noël</i> , par Louis Mainard (28 × 18)	3 »
<i>La Guerre Fatale</i> , par le Capitaine Danrit, 3 partoj en unu bel- ega volumo 1192-paĝa (29 × 18)	13 50
<i>Notre Belle Patrie</i> , par J. Monnier, 3-a eldono (28 × 18)	3 50
<i>Les Peuples de la Terre</i> , par Ch. Delon, 24 koloraj gravuraĵoj, 3-a eldono (29 × 20)	5 50

Aĉetebraj ĉe S-o Bourgary, 23, rue du Nouveau-Calvaire, Tours, Franci.

---

## MEDALO DE LA 50-a DATREVENO

### DE L' APARACIOJ EN LOURDES

dirita *Medalo de la Dankeco*.

Du modeloj : Nikelo arĝentumita, 2 fr.; nikelo arĝentumita kaj orumita, 3 fr. 75. — Poŝta rekomendo, plie 0 fr. 10 en Franci., 0 fr. 25 ekster Franci.

## KATALOGO DE ESPERO KATOLIKA

- ~~~~~*
- Katolika Preĝaro**, 1-a volumo, 180 p., kun *Imprimatur* de M-ro Renou, Ĉefepiskopo de Tours . . . . . 2 fr. 50
- Kato kun botoj**, luksa eldono, 6 ilustraĵoj. . . . . 0 fr. 50
- Cindrulino**, el sama kolekto. 6 ilustr. . . . . 0 fr. 50
- La du verkoj kune mendoataj* . . . . . 0 fr. 75
- La Katolikaj Esperantistoj ĉe la 2-a Kongreso de Esperanto** en Genevo (1906). Plena raporto kun la prediko de P-o Em. Peltier . . . . . 0 fr. 15
- Hebrea Kalendaro**, originale verkita de Pastro Jakobo Bianchini (Italo), kun *Imprimatur* de M-o Renou, Ĉefepiskopo de Tours . . . . . 0 fr. 20
- Patro Nia**, ĥoro por soprano, aldo, tenoro kaj baso, dediĉita al la *Tria Kongreso* kaj kantita dum la meso por Katolikoj en Cambridge. Teksto kaj kompono de Johano GOTHARDO (154-a verko); 6 paĝoj da muziko. Aĉetebla pogrande *nur ĉe Espero Katolika*. Prezo : 60 Sd., 1 M. 25 . . . . . 1 fr. 50
- Pri unu speco de kurbaj linioj**, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesoro DOMBROVSKI (2-a eldono). . . . . 0 fr. 65
- Pri novaj trigonometriaj sistemoj**. Originale verkis Prof. DOBROVSKI . . . . . 1 fr. 80
- Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe *E. K.*
- Katolikaj Kunvenoj dum la Tria Kongreso** en Cambridge (1907) . . . . . 0 fr. 25
- Per Telefono**, sceneto de Jacques Freneuze; kun permeso de l' aŭtoro tradukis José Guivy. . . . . 0 fr. 15

---

### PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA

1-a SERIO : 1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro. Ĉiu jaro 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.). Duono de la 3-a jaro (gis marto 1906) 1 fr. — (La kolekto gis marto 1906 5 fr. afrankite).

2-a SERIO : Duono de la 3-a jaro (de marto 1906 gis oktobro 1906) — 4-a jaro (de oktobro 1906 gis oktobro 1907) : 7 fr. 50 (En Franc. 6 fr.)

---

## INTERNACIISMO

KAJ

## PACIFISMO

1-a numero de Serio *Socialaj Demandoj en MODERNA*  
BIBLIOTEKO. . . . . 0 fr. 25

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro : Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio : Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono, 3 fr. (En Francl. 20 fr.). 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

L'ACTION FRANCISCANE (*Franciskana Agado*). — Monata organo de Franciskanaj Asocioj. Bonega Franca revuo 32-paĝa. Pritraktas socialajn demandojn. — Abono jara : 7 fr. (6 fr. en Francl.). Admistr. 117, Bd Raspail, Paris. - 6<sup>c</sup>.

LES LANGUES VIVANTES (*La Vivaj Lingvoj*), Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Eldonita de la firmo Bloud, 4, rue Madame, Paris, ĉe kiu oni devas peti specimenon.

Abonoj :	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Francl.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Ekster Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

LA REVUO. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D-o ZAMENHOF. — Ce Hachette kaj Ko, Paris. — Jare, Francujo Fr. 6; ceteraj landoj Fr. 7 fr.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, 48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto. Literatura aldono, 16 paĝoj. Jara abono : 7 fr. 50 (3 sm.). Administracio Preŝa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, monata organo de la *Societo por la Paco*. — Abono, 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj. S-o Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine, Francujo.

TRA LA MONDO, tutmonda multilustrita revuo esperanta, — Nuntempaĵoj; artoj, literaturo, scienco; komerco; industrio; militistaro, maristaro; teatro, sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono; ludoj; konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr.; kvaronjare 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

ANNALES APOSTOLIQUES DES PP. DU SAINT-ESPRIT (*Analoj Apostolaj de PP. de S-a Spirito*), 30, rue Lhomond, Paris. Jare 3 fr. 50, en Francl. 3 fr.

GAZETTE PÉRIODIQUE DE LA BOURSE DE PARIS, 3, rue d'Amboise. — Serioza grand-formata gazeto financa, France redaktata. — Abonoj : Francl. 3 fr.; ekster Francl. 6 fr.



**FRANCA-BRITA EKSPozICIO.** — Pensio por Gesinjoroj — Hejmaj komfortaĵoj. — Bano. — Moderaj prezoj. — Oni parolas Esperante, France, Angle. — S-ino O'Connor, Esperanto House. 17, St-Stephens Sqr. Bayswater, London. I

## MODERN-JOURNAL

semajna, sporta, literatura, teatra ; en Franca lingvo.

Petas korespondantojn, redaktorojn en ĉiuj urboj ;  
Estas organo de l' grava Societo de kolektistoj *L'Amicale  
Internationale Echangiste.*

Serioza konkurso 50 fr. por unu « Soneto ».

*Modern-Journal* presas la novelojn, rakontojn, kc. de siaj legantoj.

PROPAGANDA ABONO. — Detranĉante tiun anoncon : 3 fr. jare, anstataŭ 6 fr. ; — 2 fr. por 6 monat. anstataŭ 3 fr. — Directeur de *Modern-Journal*, 46, rue du Nord, Paris-18.

## PER TELEFONO

Sceneto de Jacques FRENEUZE. — Tradukis José GUVY

*Salono. Denizo sidas kaj faras anglan brodon. Apud ŝi, sur tableto, la telefono. Sonorado. Denizo eksaltas, levigas kaj dekroĉas la aŭdilon.*

DENIZO DIVOY, *posté Sinjoro Divoy*

— Alo... Fraŭlino Denizo Divoy? Estas mi mem (*Aparte*)  
Estas la voĉo de Jak'? Kio estas, kio okazas? Ĉu okazis io al la patro?

— Deziri al mi bonan tagon?... Estas afabla de vi, sed vi eliras de tie ĉi!... Vi tagmanĝis kun ni, kaj vi havis la tutan liberecon deziri al mi bonan tagon.

— Nenion alian?... Kaj estas nur pro tio, ke vi malkvietigas tiun sonorilon, kiu ĉiufoje, mi ne povas rezisti tion, igas salt-egi al mi la koron, kaj...

— Sed jes, igas salt-egi al mi la koron! Tio mirigas vin? Kion vi diras? Alo!...

— Diru do, sed mi ne konas vin. Estas tre malbone tio, kion vi rakontas al mi. Ni lasu mian koron trankvila. Mi ĉiam atendas tion, kion vi havas por diri al mi!

— Babiladi kun mi? Sed mi tre bone ekvidas tion! Sed kio okazas al vi? Neniam vi elparolas du vortojn, kiam vi estas tie

*Vidu sekvon en la libro mem. — Prezo : 0 fr. 15*